

UKRAINA STELO

GAZETO de UKRAINAJ ESPERANTISTOJ

n-ro 1-2 2017

elstaraj figuroj de la ukraina kulturo



SOLOMIJA KRUŜELNICKA

paĝo 17



MIRINDAĴO SUR LA OVOŜELO

paĝo 6

**Nina Daniljuk: “Studentoj devas vidi
veran utilon de Esperanto
en la nuntempa pragmatika vivo”**



nia intervjuo

paĝo 25

UKRAINA STELO

gazeto de ukrainaj esperantistoj
fondita de Oresto Kuzma en 1913
Aperas kvaronjare. N-ro 1-2, 2017

ENHAVO

ANSTATAŬ LA PAĜO DE LA REDAKTORO

2017 – la jaro de L. Zamenhof 3

AKTUALE

O. Oles. Memoru! 5

NIA KULTURO

O. Jasinska. Mirindaĵo sur la ovoŝelo 6

NIA HISTORIO

M. Zastavnij. La batalo apud Kruto 12

P. Tičina. Memore al la tridekopo 16

ELSTARAJ FIGUROJ

DE LA UKRAINA KULTURO

H. Tiĥobajeva. Solomija Kruŝelnicka 17

JUBILEOJ

90-jariĝo de Rostislav Bratun 23

NIA INFERVJUO

Nina Daniljuk: “Studentoj devas vidi
veran utilon de Esperanto
en la nuntempa pragmatika vivo” 25

HISTORIO DE LA E-MOVADO

EN UKRAINIO

V. Jaskovec. Kritiko pro la senkritikeco ... 28

ORIGINALA VERKADO

El la poezia kajero de Petro Palivoda 31

TRADUKADO

Tony Beckwith. Arto en la traduko 32

RIDU KUN NI! 35

Redaktoro: Volodimir Pacjurko
Arta redaktoro: Niko Voloŝin

La poŝta adreso de la redakcio:
„Ukraina Stelo“, p.k. 26,
Lucko-18, UA-43018, Ukrainio

La retadreso:
ukrainastelo@gmail.com

Ĉion por „Ukraina Stelo“ sendu
laŭ ĝia retadreso.

La papera versio de la gazeto
mendeblas ĉe Niko Voloŝin
laŭ la retadreso:
niko_helianto@yahoo.com

Ni ne pagas honorariojn.
Pri la enhavo de la kontribuoj
responsas la aŭtoroj mem.
La redakcio ne ĉiam dividas
la opiniojn de la aŭtoroj.
Ĝi lasas al si la rajton mallongigi
materialojn.

Monoferoj por malgrandigi la
prezon de la papera gazetversio
aŭ fari ĝin nula por ne pagipovaj
personoj bonvenas:
Приватбанк, картка
4149 6258 1328 2819,
Волошин Микола
Володимирович

2017 – LA JARO DE L. ZAMENHOF

En sia “Testamento” granda ukraina poeto Taras Ŝevĉenko petis: „...en nova familio / Granda kaj libera / Ne forgesu rememori min per vort’ sincera“. Ion similan Ludoviko Zamenhof ne petis. Sed pro sia verko – Esperanto, – al kiu li dediĉis sian amon kaj genion, al kiu plene oferis sin, li sendube meritas la sinceran rememoron. Zamenhof revis, ke „sur neŭtrala lingva fundamento, / komprenante unu la alian, / la popoloj faros en konsento / unu grandan rondon familian“.

Komparante tiujn ĉi eltraĵojn, ni tamen vidas, ke ambaŭ grandaj humanistoj pensis pri „familio granda“ kaj „granda rondo familia“. Se ĉe Ŝevĉenko tio estis la revo pri memstara ukraina suverena ŝtato, do Zamenhofs revo celas pli malproksiman (eble utopian, neniam realigeblan, sed certe noblan) perspektivon, kiam estos detruitaj „muroj de miljaroj“ kaj „ili ekkrakos, kaj ili ekbruos / Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero / Ekregos sur tero“.

Donacinte al la homaro la kreitan de li interhoman komunikilon, Zamenhof enmanigis la estontecon de Esperanto al la esperantistoj de la mondo, dezirante mem resti nur unu el ili.

La vivo de Zamenhof estis malfacila kaj ne tre longa: li mortis en la aĝo iom pli ol 57 jaroj, la 14-an de aprilo 1917. Por omaĝi la humaniston la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj pri edukado, scienco kaj kulturo (UNESCO) deklaris la jaron 2017 la jaro de L. Zamenhof.

Krom la lingvo mem Zamenhof heredigis al ni ankaŭ siajn pensojn, ideojn, kiuj restas aktualaj kaj realigendaj. Kelkajn el ili ni volas citi:

„Ĉiu, kiu diras, ke neŭtrala arta lingvo estas ne ebla, venu al ni, kaj li konvertiĝos. Ĉiu, kiu diras, ke la parolaj organoj de ĉiuj popoloj estas malsamaj, ke ĉiu elparolas artan lingvon alie, venu al ni, kaj, se li estas homo honesta kaj ne volas konscie mensogi,



anstataŭ la paĝo de la redaktoro

li konfesos, ke li eraris“. (El la parolo de L. Zamenhof en la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo ĉe Maro, 1905).

„La mondo venos al ni nur tiam, kiam ĝi vidos en ni potencon, kiam ĝi vidos, ke ni ne palpas en mallumo, ke ni ne perdas hodiaŭ, kion ni akiris hieraŭ, ke nia vojo estas klara kaj rekta kaj ni de ĝi neniam deflankiĝos“. (El la parolo en la IV Universala Kongreso de Esperanto en Dresdeno, 1908).

„Laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. [...] Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simple lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi. Se en nia afero aperos io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn“. (El la parolo en la VIII Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo, 1912).

Nia konkreta, riĉenhava, akorda agado kaj plena de entuziasmo aktivado en la jaro 2017 estu nia honorigo de la memoro de L. Zamenhof.

Volodimir Pacjurko

ZAMENHOF

Tra l' kurtenoj de la historio,
Tra jardekoj, dronintaj en Leto,
Konturiĝas en monda konscio
De la Majstro senmorta portreto.

Sorto, riĉa je plagoj multopaj,
Kaj la aĝo jam klinis figuron,
Sed per siaj okuloj miopaj
Klare vidas li foran futuron.

Ni senflute lin nomas Giganto.
Lia revo fariĝas jam vero:
Esperanto – la pontkonstruanto
Inter ciuj nacioj de l' tero.

1985



**La redaktoro kun sia filino
Natalia. Odeso, 1975**



Олександр ОЛЕСЬ

Oleksandr OLES

ПАМ'ЯТАЙ

Коли Україна за право життя
З катами боролась, жила і вмирала,
І ждала, хотіла лише співчуття,
Європа мовчала.

Коли Україна в нерівній боротьбі
Вся сходила кров'ю і слізьми стікала
І дружної помочі ждала собі,
Європа мовчала.

Коли Україна в залізнім ярмі
Робила на пана і в ранах орала,
Коли ворушились і скелі німі,
Європа мовчала.

Коли Україна криваві жнива
Зібравши для ката, сама умирала
І з голоду навіть згубила слова,
Європа мовчала.

Коли Україна життя прокляла
І ціла могилою стала,
Як сльози котились і в демона зла,
Європа мовчала.
22.08.1931 р.

MEMORU

Dum Ukrainio en morta batal'
La rajton de l' viv' kontraŭ bestoj defendis,
Nur volis kompaton pro sia fatal',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio, lasita de Di',
La tuta plu sangis kaj plore lamentis,
Atendis ĝi helpon amikan por si,
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio en jugo el fer'
Servutis kaj plugis, ĝin vundoj turmentis,
Eĉ rokoj sin movis pro tiu sufer',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio en sangrikoltad'
Por la torturant' sian morton jam sentis,
Eĉ vortoj mutiĝis pro nigra malsat',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio la vivon sen bon'
Malbenis kaj tombon prezentis,
Eklarmis eĉ fia malica demon',
Eŭropo silentis.
22.08.1931

Elukrainigis Petro Palivoda



MIRINDAĴO SUR LA OVOŜELO

La tradicio de ovornamado en Ukrainio estas ligita kun Pasko. La ornamitajn plurkoloraj paskovojn kune kun paskobabao, ŝinko, kolbaso, kreno oni metas en la vimenan korbon por en la antaŭtago de Pasko aŭ en la paska frumateno porti ĝin al preĝejo, ke pastro aspergu ilin per la sankta akvo. Sed la paskovo antaŭ ĉio estas arta objekto. Rakonti detale pri la signifo de la paskovo en la vivo de ukrainoj, pri la arto de paskova pentrado ni petis Oksana-n Jasinska-n, estrinon de la muzeo „Paskovo“ (ukr. «Писанка») en Kolomeo.

La muzeo de la paskova pentrado, unu el plej originalaj muzeoj de Ukrainio, festas ĉi-jare la tridekan datrevenon de sia fondo.

La historio de la muzeo, kiu estas sekcio de la Nacia muzeo de la popolarto de Huculio kaj Pokutio (NMPAHP) „Josip Kobrinskij“ komenciĝis en la jaro 1987, kiam en la preĝejo de Anunciacio, arkitektura memoraĵo de la fino de la XVI jc. (1587), estis malfermita la muzeo de la paskova pentrado.

Kiel gravaj antaŭkondiĉoj de la apero de ĉi muzeo estis ne nur bezono prezenti originalan belecon de la paskovo, riĉecon de ĝiaj ornamkomponaĵoj, la ligitajn kun ĝi kutimojn kaj ritojn, sed antaŭ ĉio neceso konservi tiun unikan genron de la popolarto, por kiu en la 70-jaroj fakte sur la tuta teritorio de Ukrainio estiĝis granda minaco de malapero. Escepto estis nur Karpata regiono.

Konsciante la gravecon de la konservo de la malnova popolarta genro, sciencoficistoj de la Nacia muzeo de la popolarto de Huculio kaj Pokutio kreis neofician programon, kies ĉefa celo estis kolekti paskovojn el ĉiuj vilaĝoj, kie ankoraŭ konserviĝis la tradicio de ilia pentrado. Dum la ekspedicioj tra la karpataj vilaĝoj estis kolektitaj multaj paskovoj kaj fiksitaj la tradicioj de ilia farado. Nome la paskovoj de tiu lando iĝis bazo de la muzeo, komenco por kiu estis la paskovoj el Kosmaĉo, kolektitaj en la komenco de la XX-a jc. far la unua direktoro de NMPAHP Volodimir Kobrinskij.

Ne malpli gravan rolon en la kreo de la muzeo ludis la metodo de la konservado de kruda ovo, elpensita ankoraŭ en la jaro 1973 far konservisto de la NMPAHP-fondusoj L. Kreĉkovskij kaj laboranto de la muzefondusoj M. Boledziuk. Tiu inventaĵo ebligis plilongigon de la ekzistado de facile rompeblaj eksponaĵoj kaj permesis apartigi la paskovojn en la memstaran sekcion.

La muzeo de la paskova pentrado en Kolomeo



Junaj vizitantoj



La muzea plafono

La apero de la muzeo tiutempe havis grandan signifon por la konservo de la malnova artogenro kaj renaskiĝo de la tradicioj de ovopentrado preskaŭ en la tuta Ukrainio. Aperis lernejoj de ovopentrado, sciencaj publikaĵoj kaj eldonaĵoj, oni komencis organizi konferencojn, festivalojn kaj kongresojn de paskovo-pentristoj.

La muzeo famiĝis tutmonde en la komenco de la 2000-aj jaroj, kiam translokiĝis en la nunan originalan konstruaĵon en la formo de la paskovo, alta 13,5 metrojn. La konstruaĵon projektis ivano-frankivska arkitekto Ihor Ŝumin. La muzeo estis inaŭgurita enkadre de la Internacia hucula festivalo la 23-an de septembro 2000.

De tiam dank' al la muzeo ne nur Kolomeo, sed ankaŭ la tuta Ĉekapratio ricevis la paskovan markon. Ĉiujare la unika muzeo allogas pli ol 150 mil vizitantojn kiel el Ukrainio, tiel ankaŭ el proksimume 70 landoj de la mondo. Ja turistoj havas la eblecon vidi ne nur originalan konstruaĵon, sed ankaŭ belegajn eksponaĵojn – paskovojn, faritajn

nia kulturo



Anna Kiceluk (vilaĝo Luĉa, Kosiv-distrikto) pentras paskovojn



gutojn de la fandita vakso. Post tio oni mergas ovon en farbon. La gutornamitaj ovojn povas esti du- aŭ plurkoloraj.

Oni uzas en la vaksodesegnado ankaŭ pinglotekniko. Sed ĉi-okaze oni metas varmegan vakson sur la ŝelon ne per vaksodesegno, sed per la kapeto de la pinglo aŭ najleto, fiksita sur la ligna tenileto, per mallongaj strekoj, punktoj, komoj, kiuj kreas plantornamaĵon. Poste oni mergas la ovon en farbon. Kutime tiaj paskovoj estas unukoloraj.

Se la surfacon de blanka aŭ bruna ovo oni ornamis per la tradicia vaksotekniko kaj poste mergis la ovon en solvaĵon de acet- aŭ salacido, sur la ovo estiĝas reliefa desegno. Tia tekniko estas nomata mordo. La vakson oni forigas per varmega akvo kaj broso.

La ovojn, pentritajn per akvofarboj, guaŝo aŭ speciala lako per kvasteto, en la komponaĵoj de kiuj dominas plantornamaĵoj, oni nomas pentritaj ovojn. Kaj por krei



Geedzj Boris (u. Kosiv, Ivano-Frankivska regiono) - majstroj de la moderna ovopentrado

skrapornamitan ovon, la ovon komence farbas en unu densan koloron. Post kiam la farbo sekiĝos, per kudrilo aŭ akra pinto de metala instrumento oni skrapas la deziratajn ornamaĵojn.

En la muzekolekto estas vaste prezentitaj ankaŭ dekoraciaj ovoj, ornamitaj per brodaĵo, bidoj, per algluita papera ornamo, per pajleroj, per plantokernoj kaj per semoj de graminacoj. La apartan grupon konsistigas ceramikaj paskovoj kaj ovoj, tornitaj el ligno kaj ornamitaj per skulptornamaj kaj inkrustaĵoj. La orientaj landoj estas prezentitaj per ovoj, faritaj el duonvaloraj ŝtonoj.

Entute la muzefondusoj nombras pli ol 12 mil eksponaĵojn. La plej malnova en la kolekto estas la paskovo, pentrita per naturkoloriloj sur la anserinovo ankoraŭ en la XV jc. Ĝi estis trovita en la jaro 2013 en Lvivo dum arkeologiaj prifosoj kaj donacita al la muzeo far arkeologoj de la sciencesplora centro „Arkeologia savservo“ de la Arkeologia instituto. Interalie, tiu paskovo estas la plej malnova en Ukrainio. Kiel ĉiuj paskovoj el la kolekto, ankaŭ ĝi estis submetita al konservado.

Preterdire, la metodo de la konservado konsistas en tio, ke oni garde disrompas duone la paskovon laŭ plej konvekso parto, forigas enhavon kaj membranon, sekigas kaj poste surgluas per la polivinilacetata gluo (PVA-gluo) la paperpecetojn sur la internan surfacon. Poste oni kungluas la duonojn laŭ la ornamaĵo, eltiras aeron. Post la sekiĝo la paskovo jam ne rompiĝos.

Aplikante diversajn teknikojn en la pentrado de paskovo, majstroj de longe tre responde rilatis al ĝiaj ornamkomponaĵoj, kiuj en diversaj vilaĝoj dum la jarcentoj ne estis ŝanĝeblaj, same kiel la vortoj de la preĝo.

La ornamaĵaro de la paskovoj ne nur el ĉiu regiono, sed ankaŭ el ĉiu vilaĝo havis siajn facile rekoneblajn specifaĵojn: kolorgamon, dominadon de tiuj aŭ aliaj simboloj. Tamen en ĉiu paskovo estas nedisigeble ligitaj malnovaj paganaj motivoj kaj la simboloj, alportitaj de kristanismo.

Unu el plej ĉefaj kaj disvastigitaj elementoj en la paskova ornamaĵo estas la sunbildoj en la formo de la diversaj sunsignoj: „kruco“, „svastiko“, „rozo“, „araneoj“, „manikoj“. La sunkulto ĉe slavo estis ligita kun la ĉevalkulto [cervokulto]. Konforme al malnovaj mitoj, la Suno alterne situas sur la tero kaj en la ĉielo. Kaj nome la cervo ĉiumatene elportas sur siaj kornoj la sunon kaj vespere ĝin forportas. La vaste uzata sur la paskovoj



La plej malnova paskovo



La paskova monero kaj la monumento al paskovo en Kanado





estas ondornamo – „meandro“ aŭ senfinaĵo. Al la akvosimboloj apartenas ankaŭ „trianguloj kun kombiloj“ kaj „rastileto“. La strekumita triangulo povas signifi plugitan kampon, la saman signifon havas ankaŭ „romboj“ kaj „kvadratoj“.

Inter la paskovaj simboloj estas atentinda la bildo de „Granda diino“ aŭ alinome „Protektantino“ aŭ „Princino“. Ŝia kulto estis ligita kun la kulto de la patrino Tero kiel naskofonto de ĉio vivanta. En la paskova arto estas vaste uzata ankaŭ la motivo de „mondarbo“ aŭ „vivarbo“, planto- kaj animalbildoj.

La paskovo estas absolute unika kreaĵo, en kiu kuniĝis plimulto da popolartaj objektoj kun bildeca kaj simbola senco. Iam oni donacis ĝin kiel signon de interpaĉiĝo, bondeziro de sano, beleco, forto, bona rikolto, uzis por protektado kontraŭ naturkatastrofoj. Unu hucula legendo emfazas, ke la mondo ekzistos ĝis tiam, ĝis kiam oni pentros la paskovojn.

En la kolekto de la muzeo krom la paskovoj de famaj majstroj de Huculio, monta parto de Bukovino kaj Pokutio konserviĝas ankaŭ tradiciaj paskovoj de Podolio, Polisiso, Ĉedniprio, Ĉenigramara regiono kaj Slobodio [diversaj regionoj de Ukrainio – la noto de la redakcio]. Apud la malnovaj paskovoj estas eksponataj ankaŭ laboraĵoj de majstroj, kiuj surbaze de la tradiciaj simboloj kaj ornamaĵoj kreas modernan ukrainan paskovon.

La ovopentrado estas vaste konata en la mondo dank’ al granda popularigo, kiun faras la ukraina diasporo. Ankoraŭ en la mezo de la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento en la kanada urbo Vegreville (provinco Alberto), kies plimulto da loĝantoj estas ukrainoj, omaĝe al 100-jariĝo de la Reĝa rajdpolico estis starigita dek metrojn alta monumento-paskovo, kiu simbolas pacon kaj sekurecon.

La ukraina paskovo trovis sian bildigon ankaŭ en monero. En la jaro 2016 la Reĝa Kanada monfabriko unuafoje en la historio fabrikis la arĝentan moneron en la formo de la ukraina paskovo en la nominalo 20 dolaroj. La aperigon de la monero la kanada registaro dediĉis al 125-a datreveno de la tempo de la unua setliĝo de ukrainoj en Kanado. La averso de la monero estas ornamita per kolora emajlo kaj prezentas elementojn de la tradicia ukraina ovopentrado, kie ĉiu elemento, kiel ankaŭ la tuta kolorgamo, plenas je riĉa simbola enhavo, sur la reverso estas portreto de la angla reĝino Elizabeto II.

Entute en la muzekolekto la paskovoj de la ukraina diasporo nombras pli ol mil,

plejparto da kiuj devenas el Usono, Polujo kaj Kanado, estas prezentitaj ankaŭ la paskovoj el Rumanio, Francio, Brazilo, Argentino, Aŭstralio.

Ekde plej malnovaj tempoj ovo ĉe multaj popoloj de la mondo estis similiĝanta kun la prabildo de la mondovo. Ĝi estis glorata, uzata en multaj ritoj de diversaj popoloj. En la muzea kolekto apartan sekcion konsistigas paskaj kaj dekoraciaj ovoj el Pollando, Slovakio, Rumanio, Ĉeĥio, Germanio, Svedio, Pakistano, Srilanko, Hindio, Indonezio, Ĉinio, Egipto, Alĝerio kaj multaj aliaj landoj de la mondo,

La interesiĝo pri la paskova pentrarto ĉiujare kreskas. Inter la vizitintoj de la muzeo multas famaj homoj – prezidentoj, ambasadoroj, ministroj, diversrangaj aŭtoritatuloj, kulturagantoj, scienculoj, fremdlandaj oficialaj personoj. Por la memoro pri sia vizito oni lasas sur la paskovo aŭtofrakon per ovodesegnilo kaj fandita abelvakso.

La popularigon de la muzeo kaj de ĝiaj kolektoj aktive kunhelpas multaj eksterlandaj ekspozicioj, okazintaj en Pollando, Germanio, Francio, Slovakio. Kompense la muzeo volonte akceptas ekspoziciojn kiel el Ukrainio, tiel ankaŭ el najbaraj landoj, konigante al la vizitantoj la tradician kaj modernan paskovan arton.

En la muzeo sukcese funkcias la Lernejo de la paskova arto. La lernokurso daŭras ses monatojn. Dum tiu tempo infanoj lernas la tradician ovodesegnadon, konatiĝas kun la historio, malnova paskova simbolaro kaj regionaj specifaĵoj de la paskova arto en Ukrainio, alproprigas al si ankaŭ aliajn teknikojn de la ovornamado. Por la turistoj la muzeo proponas la majstroklasojn pri la paskova desegnado kaj prelegojn kaj lecionojn de la muzeaj sciencoficistoj kaj de popolaj majstroj. Ĉiujare en Kolomeo okazas la Tutukrainia festivalo „Paskovo“. Ĉi-jare ĝi okazos jam la dekan fojon.

Ni bonvenigas ankaŭ vin viziti la muzeon de la paskova pentrado, ekvidi la unikan kolekton de miniaturaj ĉefverkoj, pere de kiuj vi povas ekkoni Ukrainion, ĝiajn historion kaj kulturon.





LA BATALO APUD KRUTO

La 23-an de februaro (la 8-an de marto) 1917 en la ĉefurbo de la Rusa imperio Petrogrado eksplodis revolucio. Unu semajnon poste (la 15-an de marto) la caro Nikolao II abdikis kaj sur la loko de la imperio aperis la Rusia Respubliko. En la lando estiĝis dupotenco. De unu flanko anstataŭ la malnova centra registaro aperis la Provizora registaro. Ĝi elpaŝis por daŭrigo de la Unua mondmilito, supereco de proptietaĵo kaj demokratigo de Rusio laŭ la okcidenta modelo. De alia flanko en regionoj estis kreataj Sovetoj de laboristaj kaj soldataj deputitoj. Ili postulis ĉesigon de la milito, likvidon de proptietaĵo, transdonon de tero al vilaĝanoj, starigon de la socialisma reĝimo.

La rusa revolucio iĝis impulso de la ukraina nacia movado, ja pligranda parto de Ukrainio preskaŭ dum tri jarcentoj estis rusia kolonio. La 17-an de marto 1917 en Kijivo estis kreita la Ukraina Centra Konsilio (UCK) – reprezenta organo de politikaj kaj sociaj organizaĵoj de la urbo. La 20-an de marto estis elektita ĝia gvidantaro, kiun ekstris fama historiisto Miĥajlo Hruŝevskij. La 1-an de aprilo en Kijivo okazis 100-mila manifestacio, en kiu estis metita la postulo pri la nacia kaj teritoria aŭtonomeco por Ukrainio. La kongresoj de kelkaj ukrainaj partioj kaj societoj subtenis tiun ideon. Paralele en regionoj en marto-aprilo estis kreataj Sovetoj.

La 21-an de aprilo en Kijivo okazis la Tutukrainia nacia kongreso, en kiu UCK estis transformita en la ĉefan reprezentan organon de politikaj kaj sociaj organizaĵoj de Ukrainio. La kongreso decidis celi la aŭtonomecon de Ukrainio en la konsisto de la federacia kaj demokratia Rusio. La Centra Konsilio estis kompletigita per deputitoj de diversaj regionoj kaj sociaj klasoj kaj ekfunkciis kiel provizora ukraina parlamento.

En majo la Centra Konsilio ekstraktis kun la Provizora registaro pri la agnosko de la aŭtonomeco de Ukrainio kaj demarkacio de ĝiaj limoj. Tamen la ukrainaj postuloj estis ignoritaj. Pro tio la 23-an de junio 1917 la Centra Konsilio unuope akceptis la 1-an Univerŝalon (Deklaron), kiu proklamis la aŭtonomecon de Ukrainio en la konsisto de Rusio.

La 28-an de junio estis formita la ukraina provizora registaro – Ĝenerala Sekretariato, kiun gvidis Volodimir Vinniĉenko. Komenciĝis nova traktado kun la Rusia provizora registaro pri la agnosko de la memdeklarita aŭtonomeco, rezulte de kio aperis la II-a Universalso. Ĝi nuligis la aŭtonomecon, prokrastante ĝin ĝis la okazigo de la Tutrusia fonda kunveno. Tio sendube estis grandega eraro, kiu permesis al bolŝevikoj pliaktivigi kreon de Sovetoj, preparante tiamaniere sur la ukrainaj teritorioj la grundon por la ŝtatrenverso.

La 7-an de novembro en Petrogrado okazis la ŝtatrenverso. Bolŝevikoj gvidataj de V. Lenin faligis la Provizoran registaron kaj formis la Soveton de popolaj komisaroj de Rusio, kiu iĝis nova mastro de la lando. Unu tagon poste bolŝevikoj provis preni la potencon en Kijivo. Dum la bataloj inter ili kaj subtenantoj de la Rusia provizora registaro UCK sukcesis starigi sian kontrolon super la urbo. La 20-an de novembro ĝi proprainiciate akceptis la III-an Universalon, per kiu deklaris fondon de la Ukraina Popola Respubliko (UPR) kiel aŭtonomio en la konsisto de la Rusia regno. En UPR eniris la teritorioj, loĝataj precipe de ukrainoj: Kijiva, Podolia, Volinia, Ĉernigiva, Poltava, Ĥarkiva, Jekaterinoslava, Ĥersona kaj Tavria (sen Krimeo) gubernioj. La aligo de Kurska, Voroneĵa, Ĥolmaj provincoj kaj aliaj teritorioj kun la ukraina loĝantaro estis solvenda per traktado. La Universalso deklaris vastan programon de sociaj reformoj kaj enhavis la promeson komenci pactraktadon pri la eliro de Ukrainio el la mondmilito.

La deklaro de la Ukraina Popola Respubliko elvokis malkontenton de la bolŝevisma registaro en Petrogrado. En la nokto de la 11-a al la 12-a de decembro ĝi provis ribeli en Kijivo kontraŭ la Centra Konsilio, sed fiaskis. La ukrainigitaj milittrupoj senarmigis la bolŝevikajn taĉmentojn kaj ekzilis ilin el Ukrainio.

Responde la 14-an de decembro la oficiala Petrogrado faris ultimaton al la ukraina registaro, postulante ĉesigi la senarmigon kaj fakte, rezigni la potencon. Samtempe bolŝevikoj malfermis en Kijivo la Tutukrainian kongreson de Sovetoj, en kiu estis planite konkeri la Centran Konsilion per reelekto de ĝia konsisto kaj estraro. Malgraŭ tio la kongresdelegitoj esprimis sian subtenon al la Centra Konsilio kaj al ĝia kurso, proklamita per la III-a Universalso, kaj la 20-an de decembro la Centra Konsilio mem malakceptis la ultimaton. La planoj de la bolŝevista gvidantaro estis neniigitaj kaj ĝi komencis apertan agresion kontraŭ la Ukraina Popola Respubliko.

La 22-an de decembro la ruĝgvardiaj taĉmentoj okupis la ukrainan Ĥarkivon. Du tagojn poste bolŝevikoj malfermis en la okupita urbo la alternativan Tutukrainian kongreson de Sovetoj, kiu deklaris fondon de la Ukraina Soveta Popola Respubliko kun la ĉefurbo Ĥarkivo kiel aŭtonomio en la konsisto de la soveta Rusio. La gvidorgano de tiu ĉi formaĵo – la Centra ekzekutiva komitato – publikigis manifeston pri faligo de la potenco de la Centra Konsilio, nuligis la malpermeson pri transporto de la ukraina greno al Rusio, faritan de la ukraina registaro, kaj oficie alvokis la Soveton de la popolkomisaroj sendi helpon. La 7-an de januaro 1918 la 30-mila rusa bolŝevista armeo komencis ĝeneralan ofensivon al Kijivo. Sub la komando de Antonov-Ovsejenko la 20-mila taĉmento iris al la oriento de Ukrainio, kaj de nordoriente ofensivis la taĉmento de Miĥail Muravjov. Fine de la monato la soveta potenco estis jam starigita en Ĥarkiva, Jekaterinoslava kaj Poltavaj gubernioj.

Post la okupacio de Ĥarkivo far bolŝevikoj la ukraina registaro sin turnis al la in-

nia historio

ternacia komunumo kun la noto, ke ĝi efektivigos la internaciajn rilatojn sendepende de Rusio. Ukraina delegitaro aliĝis al la pactraktado en Brest-Litovskij, kiu okazadis inter la Kvaropa Alianco kaj bolŝevikoj. Ukrainoj postulis finon de la mondmilito sur la ukraina parto de la fronto. Estis traktataj ankaŭ la demandoj pri la eniro de Galicio, Bukovino, Transkarpatio, Ĥolmio kaj Podlaĥio en la konsiston de UPR aŭ kreo el tiuj teritorioj de la naci-teritoria aŭtonomio en la konsisto de Aŭstrio-Hungario.

Pro la malamika politiko de la rusia gvidantaro rilate al Ukrainio la 22-an de januaro 1918 la Ukraina Centra Konsilio akceptis la IV-an Universalon. Ĝi proklamis la sendependecon de la Ukraina Popola Respubliko de Rusio kaj alvokis ukrainojn al la batalo kontraŭ bolŝevikoj: „De nun la Ukraina Popola Respubliko iĝas memstara, de neniŭ dependa, libera, suverena ŝtato de la ukraina popolo... Ni alvokas ĉiujn civitanojn de la memstara Ukraina Popola Respubliko firme stari je la gardo de la akiritaj libereco kaj rajtoj de nia popolo kaj tutforte defendi sian sorton kontraŭ ĉiuj malamikoj de la vilaĝan-laborista memstara Ukraina Respubliko“.

Bolŝevikoj rapidis okupi Kijivon. La ĝeneralan komandadon de la operaco pri la okupo de la ĉefurbo efektivigadis M. Muravjov, sub la persona gvidado de kiu estis grupo de ĉirkaŭ 6 mil homoj, ĝi havis mitralojn kaj artilerion. La ofensivo al la urbo estis realigata far du grupoj: unu per la fervojo Ĥarkivo-Poltavo-Kijivo, la dua en la direkto Kursko-Baĥmaĉo-Kijivo,

La tiutempa stato de la armeo de UPR estis plorinda. Se somere 1917 la kvanto de militistoj, kiuj subtenis la Centran Konsilion, nombris ĉ. 300 000 homojn, do jam en la komenco de la 1918 jaro ĝi nombris en la tuta lando nur proksimume 15 000. Tion, laŭ la opinio de historiistoj, kaŭzis demoralizo de la ukrainaj trupoj, ilia laciĝo pro la milito, sed pleje bonega sistemo de bolŝevikaj agitantoj, kiuj klinadis al sia flanko tutajn taĉmentojn de la UPR-armeo. La alia minaco estis granda kvanto de la civila loĝantaro, subtenanta bolŝevikojn, eĉ en Kijivo.

La 5-an de januaro en la kunveno de studentoj de la Universitato „Sankta Volodimir“ kaj Ukraina popola universitato estis decidite krei studentan kurinon (roton) de Siĉpafistoj. Baldaŭ en kijivaj gazetoj aperis alvoko „Al la ukraina studentaro“ „senprokraste veni kun helpo al sia lando kaj popolo, unuanime stariĝinte sub la standardon de la batalantoj por la libereco de Ukrainio,.. kontraŭ ajna prezo haltigi la militiron, kiu povas alkonduki Ukrainion al terura ruino kaj longtempa stagnado“. El la studentoj-volontuloj de la universitatoj kaj el la lernantoj de superaj klasoj de la kijiva ukraina gimnazio „Cirilo-Metoda frataro“ estis formitaj du centoj, komandi kiujn oni komisiis al la studento de la Ukraina popola universitato Andrij Omelĉenko.

Por gardi la limojn de Ukrainio de norde sur la stacio Baĥmaĉo staris ukraina garnizono, konsistanta el la lernantoj de la I-a Kijiva junkra (junula militista) lernejo „Bohdan Ĥmelnickij“. La 26-an de januaro 1918 venis la sciigo de la komandanto de tiu taĉmento Averkij Honĉarenko pri neceso urĝe helpi kontraŭ la proksimiĝanta atako de bolŝevikaj taĉmentoj. Kaj jam sekvatage venis por plifortigo la unua cento de la ĵus kreita studenta kurino. La plimulto de studentoj havis neniun militistan preparon, du rapide formitaj centoj havis nesufiĉe da municio kaj estis malbone armitaj. Ili havis nur 16 mitralojn kaj unu kanonon, lokitan sur platvagono.

Ne kuraĝante renkonti la malamikojn en Baĥmaĉo, kie estis ĉ. 2000 probolŝevistaj

laboristoj, Averkij Hončarenko ordonis al la junkroj retiriĝi al la fervojstacio Kruto (ukr. Крۇти) kaj defensiva stariĝi. Ili atingis la lokon la 28-an de januaro. La pozicioj, situantaj kelkcent metrojn for de la stacio mem, estis nemalbonaj por la batalo. En la dekstra alo ili havis artefaritan baron – la fervojan taluson, en la maldekstra la studenta cento komencis fosi tranĉeojn kaj konstrui terfortikaĵojn. La studenta kurino estis dividita je kvar plotonoj po 28-30 homoj. La tri el ili okupis pozicion en la tranĉeoj, la kvara, kiu konsistis el la plej junaj kaj el tiuj, kiuj ne sciis pafi, estis en rezervo.

La sekvan matenon la 29-an de januaro, proksimume je la 9-a horo komenciĝis atako. Ĝi daŭris pli ol 5 horojn. Ukrainoj rebatis kelkajn atakojn, suferinte multajn perdojn. Perdojn suferis ankaŭ bolŝevikoj, sed iliaj vicoj estis kompletigataj per la konstante alirantaj taĉmentoj. Ilia kanonbaterio pli kaj pli celtrafe pripafis la ukrainajn poziciojn. De la malfronto ilin subtenis la kirastrajno.

Tiutempe ĉe la studentoj kaj junkroj preskaŭ elĉerpiĝis kugloj kaj kanonobusoj. Bolŝevikoj komencis ĉirkaŭiri la ukrainajn poziciojn de maldekstre. Ekestis danĝero esti ĉirkaŭigita, kaj junkroj kun studentoj komencis retiriĝi en la direkto al Kijivo. La junkroj estis retiriĝantaj sub la ŝirmo de la fervoja taluso, kaj ĉe la studentoj de antaŭe kaj malantaŭe estis neŝirmita loko. La komandanto de la studenta cento Omelĉenko decidis per la bajonetatako rebati la malamikon kaj jam poste retiriĝi. Sed la atako ne sukcesis, ja al la junuloj kontraŭstaris profesiaj militistoj. La cento suferis gravajn perdojn. Pereis ankaŭ la komandanto. La helpo de la rezervuloj ne lasis bolŝevikojn ĉirkaŭigi kaj ekstermi la studentojn. Preninte la mortigitojn kaj vunditojn, la ukraina batalantaro retiriĝis al la milittrajno. Bolŝevikoj aŭ ne volis aŭ ne povis atingi la restintajn ukrainajn fortojn kaj daŭrigi samtage la ofensivon al Kijivo, ĉar parto de la fervojo estis malmuntita de ukrainoj.

Ĉirkaŭ la 17-a horo kolektiĝis ĉe la milittrajno ĉiuj restintaj ukrainaj batalantoj kaj evidentiĝis, ke mankas unu studenta plotono. Retiriĝante en krepusko anoj de tiu plotono perdis orientiĝon kaj eliris rekte al la stacio Kruto. La stacio jam estis okupita de bolŝevikoj, kiuj kaptis 27 malfeliĉulojn. Oni torturis ilin kaj poste pafmortigis. Laŭ la atestoj de okulvidintoj la lernanto de la 7-a klaso Hrihorij Pipskij antaŭ la pafmortigo ekkantis „Ne jam mortis Ukrainio“ (la nacian himnon) kaj ceteraj kaptitoj subtenis la kantadon.

La malamikaj trupoj, partoprenintaj la batalon, 10-oble superis la ukrainan trupon (4000:400). La ukraina flanko perdis ĉ. 150 homojn, la malamika – ĉ. 300. La defendantoj de la ukraina suvereneco retiriĝante ruinigis post si la fervojtrakon kaj pontojn kaj tiaminere prokrastigis la bolŝevikam militiron al Kijivo je kvar tagoj.

Notindas, ke en la tago de la batalo apud Kruto en Kijivo okazis la probolŝevika ribelo de laboristoj en la uzino „Arsenalo“, kiu estis subpremita de UCK. Pro tio la ukraina milittrupo, destinita iri al Kruto, estis resendita al Kijivo, kaj anstataŭ ĝi estis senditaj la junuloj.

La prokrastigo de la rusa ofensivo ebligis al la ukraina delegitaro fari Brestlitovskan pactraktaton, kiu savis junan ukrainan suverenecon. Laŭ la decido de la Centra Konsilio la 18-an de marto 1918 la korpoj de la ekzekutitaj ukrainaj junuloj estis solene reenterigitaj sur Askolda tombo en Kijivo. En la funebra ceremonio Miĥajlo Hruŝevskij nomis la agon de la kijiva junularo heroaĵo. La poeto Paŭlo Tiĉina dediĉis al la herooj

nia historio

sian poemon „Memore al la tridekopo“. Post tio dum pli ol 70 jaroj tiu evento estis prisilentata en Sovetio. Kompense ĝi estis konstante memorata de la ukrainoj, loĝantaj ekster Sovetio.

La honorigo de la herooj sur la ŝtata nivelo komenciĝis en 2004. En la jaro 2006 apud la stacio Kruto omaĝe al ili estis starigita la monumento: sur la 7 metrojn alta kurgano staras la ruĝa 10-metra kolono, kiu similas al la kolonoj de la kijiva universitato „Sankta Volodimir“ (nun la universitato „Taras Ŝevĉenko“), de kie estis la plimulto de studentoj, partoprenintaj la batalon. En la piedo de la kurgano staras kapelo kaj apud la monumento estis elfosita lago en la formo de la kruco.

**Laŭ la materialoj de Vikipedio
prilaboris Miron ZASTAVNIJ**

Paŭlo TIĈINA

MEMORE AL LA TRIDEKOPO

Ĉe Askolda tombo-monto
Freŝfosita ter’.
Tridek junaj ukrainoj
Falis en sufer’.

Kuŝas en la ter’ la kremo
De Ukraini’!
Al futur’ laŭ sanga vojo
Devos iri ni!

Kiun do atencis venĝe
La perfida man’?
L’ suno brilas, ludas vento,
Plaŭdas Dnepr’-titan’...

Ĉu Kaino renaskiĝis?
Dio, punu lin!
La patrion ili ĉiuj
Amis ĝis la fin’.

En la Nova Testamento
Sankta sinofer’ –
Ĉe Askolda tombo-monto
Freŝfosita ter’.



Tradukis Paŭlo Moĵajev

Halina TIĤOBAJEVA,
direktorino de la Muzika memoriga muzeo
de Solomija Krušelnicka en Lvivo

SOLOMIJA KRUŜELNICKA



La mondfama ukraina kantistino Solomija Krušelnicka en la muzika mondo de la fino de la XIX-a – unua kvarono de la XX-a jarcento estis simbolo de perfekteco kaj nesuperiteco. Ŝia nekompareble bela lirika-drama soprano en la preskaŭ trioktava diapazono estas vere unika fenomeno inter kantistaro. La fama itala muzikologo R. Cortopassi tiel difinis la lokon de la kantistino en la historio de la operarto: „En la unuaj jardekoj de la XX-a jarcento sur la opercenejoj de la mondo regis kvar personoj de la vira sekso – Battistini¹, Caruso², Titta Ruffo³, Ŝalapin⁴. Kaj nur unu virino sukcesis atingi iliajn altecojn kaj stariĝi samnivele apud ili. Ŝi estis Solomija Krušelnicka. Sed kompare kun siaj gloraj kolegoj ŝi evidentiĝis multe pli alta kiel personulo. Foje pli enigma, preskaŭ ĉiam pli multfaceta kaj pli celkonscia – trieca kaj unueca personeco de la aktorino-kantistino- muzukustino“. La plej prestiĝaj teatroj kaj koncertejoj de la mondo invitadis ŝin koncerti, la plej elstaraj dirigentoj Arturo Toscanini⁵, Leopoldo Mugnone⁶, Cleofonte Campanini⁷ entuziasme kunlaboris kun ŝi. La eminentaj komponistoj G. Puccini⁸, A. Catalani⁹, R. Strauss¹⁰, Z. Noskowski¹¹ esprimis al Krušelnicka sian dankon pro brila plenumo de la ĉefpartoj en iliaj operoj. Mikola Lisenko¹² nomis ŝin „arta perlo de la ukraina nacio“, Vasil Stefanik¹³ estis ravita de la samlandanino, kiu „havas belegan voĉon kaj saĝan vizaĝon“.

La repertuaro de la kantistino nombris pli ol 60 operojn de diversepokaj komponistoj, stiloj kaj skoloj. Ŝi egale brile montris sin en la operaj spektakloj de la reformisto Wagner¹⁴, malfrua romantikisto Puccini, veristoj Mascagni¹⁵ kaj Boito¹⁶ kaj ankaŭ en la komplika ekspresionisma muziko de R. Strauss. Pro la specifa drama talento oni komparis S. Krušelnicka-n kun la plej elstaraj tiutempaj aktorinoj Eleonora Duse¹⁷ kaj Helena Modrzejewska¹⁸.

elstaraj figuroj de la ukraina kulturo

Ne malpli ol tri popoloj – la ukraina, la itala kaj la pola – konsideras Solomijan Krušelnicka-n sia nacia kantistino. La germana komponisto kaj muzikkritikisto K. Drosste nomis ŝin “kantistino de specifa internacia karaktero“. Vere, ĉiuflanke dotita kaj klera, ŝi kun perfekta dikcio parolis kaj kantis pole, ruse, itale, germane, hispane, france. Sed ĉiam, ĉie, antaŭ ajna publiko, kien ajn ne sendus ŝin la sorto, Krušelnicka restis fidela filino de sia popolo.

Solomija Krušelnicka naskiĝis la 23-an de septembro 1872 en la vilaĝo Bilavinci (nun Buĉaĉa distrikto de Ternopola provinco). La infanecjaroj de la estonta kantistino pasis en la vilaĝo Bila proksime de Ternopolo. La gepatroj de Solomija – Ambrozij Krušelnickij kaj Teodora Savĉinska – devenis el malnovaj gentoj de ukrainaj sacerdotoj. Ili havigis al siaj infanoj bonan klarecon, inokulis amon al la patrujo, popolaj tradicioj, inter kiuj la honoran lokon okupis la muzikarto.

La unua profesia instruistino de juna Krušelnicka pri kantarto estis Eŭgenia Barvinska, sub kies gvido Solomija plenumis solajn partojn kun la ĥoro „Rus’ka besida“ [„Ukraina konversacio“] en la koncertoj en Ternopilo. En la jaroj 1891-1893 ŝi studis en Lvova konservatorio de la Galicia Muzika Societo en la klaso de la fama profesoro Walery Wysocki. Sur la scenejo de la Skarbek-teatro (nun Lvova dramteatro „Maria Zankovecka“) la 15-an de aprilo 1893 Solomija Krušelnicka sukcese debutis en la opero de G. Donizetti¹⁹ „Favoritino“.




S. Krušelnicka en la roloj de Cio-Cio-San kaj Aida

Post sukcesaj elpaŝoj en Lvovo S. Krušelnicka decidis daŭrigi siajn studojn en Italio. Aŭtune 1893 ŝi iras al Milano, kie ŝia instruistino pri kantarto estis sperta pedagogo profesorino Fausta Crespi. Malgraŭ la komplikaj, ligitaj kun plialtigo de la tesituro de la voĉo, kiu plialtiĝis de mezosoprano ĝis la lirika-drama soprano, kio pli bone respondis al ĝia naturo, la juna artistino jam post unu jaro sukcese kantas sur la scenejoj de operejoj. Tiutempe ŝi laboras super perfektigo de sia voĉo, multe legas, lernas fremdajn lingvojn. La formadon de la mondriĝado de la juna kantistino kunhelpas ŝia korespondado kun la ukraina verkisto, publicisto kaj socia aganto Miĥajlo Pavlik.

Printempe 1894 Krušelnicka subskribas kontrakton kun la direkcio de Lvova teatro. La unua elpaŝo de la kantistino sur la patrolanda scenejo post ŝiaj studoj en Italio okazis en la opero „Faŭsto“ de C. Gounod²⁰, kie ŝi plenumis la parton de Margarita. Muzika kritikistaro tre diskrete eĥiĝis je la elpaŝo, ne perceptinte la „novan“ voĉon de Solomija kaj ŝian originalan traktadon de la bildo de la operheroino. Tamen tiu kritika situacio

malkovris veran karakteron de Krušelnicka – persistecon kaj volon venki, Ŝia devizo fariĝas la vortoj „Konkeri aŭ hejme ne aperi!“. Vere, kun ĉiu nova spektaklo – „Aida“, „Maskobalo“, „Trobadoro“, „Afrikanino“, „Halka“, „La bieno de fantomoj“ – Krušelnicka akiras ĉiam pli da favoro de la Ivova publiko kaj de muzikkritikistoj. Rezulte la teatrogvidantaro invitas la artistinon por la



Kun la edzo Cesare Riccioni

somera sezono 1895 kaj ŝi kun konstanta sukceso kantas en la operoj „La bieno de fantomoj“ [„Straszny dwór“] de S. Moniuszko²¹, „Carmen“ de G. Bizet²² (la parto de Mikaela), „La hugenotoj“ de G. Meyerbeer²³. Samjare la kantistino forveturas por kelkaj monatoj Vienon, kie helpe de la profesoro Gensbacher studas verkaron de la elstara germana komponisto-reformisto R. Wagner, por poste fariĝi unu el la plej bonaj plenumantinoj de la sopranpartoj en liaj operoj. La sukcespinto de Krušelnicka-vagneranino estis ŝia elpaŝo en „Grand Opéra“ en la jaro 1902 en la rolo de Elza („Loengrino“), post kiu muzikkritikistoj skribis, ke la juna kantistino dum unu vespero konkeris Parizon.

En la jaroj 1895-96 S. Krušelnicka estis dufoje invitita al Krakovo por gastaj elpaŝoj. Tie ŝi unuafoje kun granda sukceso kantas en la opero de R. Wagner „Loengrino“. En Krakovo la kantistino konatiĝas kaj proksimiĝas kun la societo de junaj ukrainoj kaj poloj, inter kiuj estis Vasil Stefanik, Ivan Truŝ²⁴, Władysław Orkan²⁵, Sofia Okunevska²⁶, Waclaw Moraczewski²⁷.

La 26-an de decembro 1895 okazis la sukcesa debuto de Krušelnicka sur la itala scenejo en „Manon Lescaut“ de G. Puccini (la teatro „Amilcare Ponchielli“, urbo Kremono). kiu komencis ŝian triumfan iron tra la teatroj de la Apenina duoninsulo. Ŝi elpaŝas en Milano, Parma, Triesto, Udino.

Por la vintra sezono 1896-1897 la kantistino estis invitita de la administracio de Odesa operejo, sur la scenejo de kiu dum kelkaj monatoj ŝi elpaŝis en 35 spektakloj. Laŭ la opinio de muzikkritikistoj ŝi estis nesuperebla en la rolo de Raĥel („La judino“ de F. Halévi²⁸), kaj krono de ŝia rekonio fariĝis la benefico en la parto de Desdemona („Otello“ de Verdi²⁹). En Odeso S. Krušelnicka konatiĝis kaj komunikiĝis kun la ukrainaj verkistoj kaj kulturagantoj Miĥajlo Komarov³⁰, Marko Kropivnickij³¹.

Preskaŭ ĉiujare la artistino vizitis la patrolandon por partopreni Ŝevĉenkajn koncertojn, en kiuj sonis en ŝia perfektega plenumo kantoj de Mikola Lisenko je la vortoj de la poeto. Bedaŭrinde, S. Krušelnicka ne havis okazon por pesone renkontiĝi kun la elstara komponisto, kiu kun pietato rilatis al ŝi, dediĉis al ŝi siajn kelkajn solkantojn, kiuj fariĝis ornamo de la ĉambra repertuaro de la kantistino. Grandan influon sur formadon de la personeco de Krušelnicka havis la figuro de Ivan Franko. Ŝi gratulis la verkiston okaze de liaj kreaĵ jubileoj, sendis monon por subteni la radikalan partion,

elstaraj figuroj de la ukraina kulturo

alte aprezis, laŭ ŝiaj vortoj „vere eŭropan revuon“ „Ĵitje i slovo“ [„La vivo kaj la vorto“], kiun eldonadis Franko.

La sekva paĝo en la artista kariero de S. Kruŝelnicka estas ŝiaj brilaj elpaŝoj sur la scenejo de la Varsovia operejo en la jaroj 1898-1902. Polaj muzikkritikistoj konsideris la artistinon nesuperebla en ĉiuj ŝiaj spektakloj (tiutempe en ŝia repertuaro estis pli ol 30 operoj), sed precipe aprezis ŝin pro la majstra plenumo de la ĉefpartoj en la operoj de S. Moniuszko „Halka“ kaj „La grafino“. La ukraina kantistino estis invitita partopreni la 500-an, jubilean spektaklon de „Halka“, okazinta la 9-an de decembro 1900. La partneroj de Solomija sur la varsovia scenejo estis la plej famaj tiutempaj kantistoj – Caruso, Battistini, Didur³², Russitano³³, Miŝuha³⁴, Nosalewicz³⁵ kaj aliaj. Bedaŭrinde, granda populareco de Kruŝelnicka elvokis envion ĉe certa rondo de homoj, kiuj provokis skandalon en gazetaro, aplikante kalumniojn kaj mensogojn. La atmosfero de alta arto estis rompita kaj la artistino decidis forlasi Varsovion malgraŭ petoj de multaj geamikoj kaj publiko, kiu ĉiam manifestis al ŝi sian admiron.

En la komenco de la jaro 1903 Kruŝelnicka sukcese elpaŝas sur la scenejo de la teatro „San-Carlo“ en Napolo, triumfante el la rolo de Aida („Aida“ de G. Verdi). La kantistino kreis novan, neordinaran, tamen perfektan bildon de la heroino, kiu iĝis elstara fenomeno en la historio de la operaktorado.

La plej granda sensacio en la muzika mondo komence de la XX jarcento iĝis la historio de fiasko kaj renaskiĝo de „Madama Butterfly“ [„Sinjorino Papilio“] de G. Puccini. Post kiam la opero estis prifajfita en „La



La operejo en Lviv portas la nomon de la kantistino

Scala“ februare 1904, malmultaj homoj kredis ĝian renaskiĝon. Tamen „bunta papilio de Puccini“ reviviĝis dank’ al nia samlandanino, kiu laŭ la invito de la komponisto partoprenis la duan premieron, okazintan la 28-an de majo en la teatro „Grande“ (urbo Breŝio). Gazetoj konkure skribis, ke sian sukceson la opero ŝuldas al la ukraina kantistino. Danka kaj kortuŝita komponisto subskribis por ŝi sian porteton: „Al la plej bela kaj plej ĉarma Batterfly. Giacomo Puccini. La jaro 1904“.

Sian glorapogeon Kruŝelnicka atingis per la elpaŝoj en la operoj de Richard Strauss „Salome“ kaj „Elektra“ en la teatro „La Scala“ en la jaroj 1906-1909., kiujn surscenigis la genia itala dirigento Arturo Toscanini. La kunlaboro de la kantistino kaj dirigento en la plej prestiĝa itala teatro estis tre fruktodona. Muzikkritikistoj konstatis sur la gazetaj paĝoj: „Salome“ triumfas en la milana „La Scala“ dank’ al la magio de Toscanini kaj ŝorcoj de Kruŝelnicka“.

En la periodo de la jaroj 1904-1912 S. Kruŝelnicka elpaŝas en la operejoj de Italio,

Hispanio, Portugalio, Egipto, Alĝerio, Brazilo. La plej oftaj estis la turneoj atra Argentino, kie ŝi havis multajn geamikojn kaj ŝatantojn. Ĝuste en Bonaero en la jaro 1910 la kantistino edziniĝis al la itala advokato Cesare Riccioni. La geedzoj ekloĝis en la banloka urbeto Viareggio (Italio), kie feliĉe loĝis 26 jarojn.

Post la unua mondmilito S. Krušelnicka finas sian operan karieron kaj komencas prepari la koncertan repertuaron. La ĉambraj elpaŝoj de la kantistino guis grandan popularacon kaj havis vastan geografion. En ŝia repertuaro estis prezentitaj diversstilaj kaj diversepokaj komponistoj: de C. Monteverdi³⁶ ĝis C. Frank³⁷, de W. Mozart³⁸ ĝis M. Musorgskij³⁹, kaj ankaŭ ŝiaj samtempuloj: I. Pizeti⁴⁰, O. Respigi⁴¹, S. Raĥmaninov⁴², M. Lisenko, O. Niĵankivskij⁴³, S. Ludkeviĉ⁴⁴. Ĉiun solkoncerton Krušelnicka estis finanta per ukrainaj popolaj kantoj. En la jaro 1928 la kantistino kun grandega sukceso turneis tra la urboj de Usono, Kanado kaj Galicio.

En aŭgusto 1939 Solomija Krušelnicka venis ripozi al siaj parencoj en Karpatoj. Tie kaptis ŝin la Dua mondmilito. En la fino de novembro la domo en Lvovo, kiu estis la proprietaĵo de la kantistino, ŝtatigis la soveta potenco. Vintre 1940 al la artistino okazis ankoraŭ unu malfeliĉo – ŝi rompis la gambon ĉe la kokso kaj estis alforĝita al la lito kelkajn jarojn.

Post la fino de la milito S. Krušelnicka estis invitita al la katedro de solkantado de Lvova konservatorio. La lecionoj kun studentoj kutime okazis en la domo de la kantistino.



**La tombo de la kantistino
sur Liĉakiva tombejo en Lviv**

Notoj:

- 1 – Mattia Battistini (1856-1928) – itala operkantisto-baritonulo.
- 2 – Enrico Caruso [elparolu Enriko Karuzo] (1873-1921) – itala operkantisto-tenorulo.
- 3 – Titta Ruffo (1877-1953) – itala operkantisto-baritonulo.
- 4 – Fjodor Ŝalapin (1873-1938) – rusa operkantisto-basulo.



**La domo de Krušelnicka en Lviv.
En la unua etaĝo nun estas ŝia muzeo**

Kiel konservatoria profesoro ŝi ĉiujare okazigis la tiel nomatajn „raportajn koncertojn“, mirigante ĉiujn per la majstreco kaj alta plenumkulturo en siaj preskaŭ 80 jaroj. La soveta potenco penis ĉiel plimalgrandigi la meritojn de la artistino. Tamen ŝin amis kaj estimis junularo, la pli aĝa generacio konservadis en sia memoro la eventojn de ŝia glora artista vivo, kaj Solomija mem poioe iĝis legendo.

La 16 de novembro 1952 ĉesis bati la koro de la Granda Artistino.

elstaraj figuroj de la ukraina kulturo

- 5 – Arturo Toscanini [elp. Toskannini] (1867-1957) – itala komponisto.
- 6 – Leopoldo Mugnone [elp. Munjone] (1858-1941) – itala komponisto.
- 7 – Cleofante Companini [elp. Kleofante Kompanini] (1860-1919) – itala komponisto
- 8 – Giacomo Puccini [elp. Ĝakomo Puĉĉini] (1858-1924) – itala komponisto.
- 9 – Alfredo Catalani [elp. Katalani] (1864-1893) – itala komponisto
- 10 – Richard Strauss [elp. Riĥard Štraus] (1864-1949) – germana komponisto.
- 11 – Zygmunt Noskowski (1846-1909) – pola komponisto kaj dirigento.
- 12 – Mikola Lisenko (ukr. Микола Лисенко) (1842-1912) – la plej granda ukraina komponisto, dirigento, kulturaganto.
- 13 – Vasil Stefanik (ukr. Василь Стефаник) (1871-1936) – ukraina novelisto.
- 14 – Wilhelm Richard Wagner (1813-1883) – germana komponisto, dirigento, verkisto-publicisto.
- 15 – Pietro Mascagni [elp. Pjetro Maskanĵi] (1863-1945) – itala komponisto.
- 16 – Arrigo Boito [elp. Bojto] (1842-1918) – itala komponisto kaj poeto.
- 17 – Eleonora Duse [elp. Duze] (1858-1924) – itala aktorino.
- 18 – Helena Modrzejewska [elp. Modĵejevska] (1840-1909) – pola aktorino.
- 19 – Gaetano Donizetti [elp. Donicetti] (1797-1848) – itala komponisto.
- 20 – Charles Gounod [elp. Ŝarl Guno'] (1818-1893) – franca komponisto.
- 21 – Stanisław Moniuszko [epl. Moniuŝko] (1819-1872) – pola kaj belorusa komponisto kaj dirigento.
- 22 – Georges Bizet [elp. Ĵorĵ Bize'] (1838-1875) – franca komponisto.
- 23 – Giacomo Meyerbeer [elp. Ĝakomo Mejerber] (1791-1864) – germana kaj franca komponisto.
- 24 – Ivan Truŝ (1869-1941) – ukraina pentristo.
- 25 – Władisław Orkan (1875-1930) – pola verkisto.
- 26 – Sofia Okunevska (1865-1926) – ukrainino, la unua virino-kuracistino en Aŭstrio-Ungario, doktorino pri medicino.
- 27 – Waclaw Moraczewski [elp. Moraĉevski] (1867-1950) – pola kaj ukraina kuracisto kaj veterinaro, rektoro de Lvova akademio de veterinara medicino, edzo de Sofia Okunevska.
- 28 – Fromental Halévi (1799-1862) – franca komponisto.
- 29 – Verdi [elp. Ĝuzeppe] (1813-1901) – itala komponisto kaj dirigento.
- 30 – Miĥajlo Komarov (1844-1913) – ukraina verkisto.
- 31 – Marko Kropivnickij (ukr. Кропивницький) (1840-1910) – ukraina dramaturgo kaj aktoro.
- 32 – Adam Didur (1873—1946) – pola operkantisto-basulo.
- 33 – Giuseppe Russitano – hispana operkantisto-tenorulo.
- 34 – Oleksandr Miŝuha (ukr. Олександр Мишуга) (1853-1922) – ukraina operkantisto, lirik-drama tenorulo.
- 35 – Oleksandr Nosaleviĉ (ukr. Олександр Носалевич) (1874-1969) – ukraina operkantisto,
- 36 – Claudio Monteverdi [elp. Klaŭdio] (1567-1643) – itala komponisto.
- 37 – César Franck [elp. Sezar' Frank] (1822-1890) – franca komponisto.
- 38 – Wolfgang Amadeus Mozart [elp. Mocart] (1756-1791) – aŭstra komponisto.
- 39 – Modest Musorgskij (1839-1881) – rusa komponisto.
- 40 – Ildebrando Pizzeti (1880-1968) – itala komponisto kaj dirigento.
- 41 – Ottorino Respighi [elp. Respigi] (1879-1936) – itala komponisto.
- 42 – Sergej Raĥmaninov (1873-1943) – rusa komponisto.
- 43 – Ostap Niĵankivskij (ukr. Нижанківський) (1863-1919) – ukraina komponisto, dirigento, socia aganto.
- 44 – Stanislav Ludkeviĉ (1879-1979) – ukraina komponisto.

La artikolo estis verkita speciale por „Ukraina Stelo“.



ROSTISLAV BRATUN

Rostislav Bratun (ukr. Ростислав Братунь) estis fama ukraina poeto, publicisto kaj socia aganto. Naskiĝis la 7-an de januaro 1927 en la urbeto Lubomlo de Volinia provinco. Studis en Lviva universitato „Ivan Franko“. Aŭtoro de pli ol 20 poemoj. Redaktis prestiĝan ukrainan literaturan gazeton, estris Ivvian verkistan organizaĵon. Estis popoldeputado de Sovetunio, nome li diris al M. Gorbaĉov: „Ukrainio estos libera“. Multe kunlaboris kun elstaraj ukrainaj komponistoj Volodimir Ivasjuk, Anatolo Kos-Anatolskij, Ihor Bilozir. La unua komponis muzikon por 25 poemoj de la poeto. Mortis la 8-an de marto 1995 en Lvivo. Oni supozas, ke li estis venenigita.

LA KANTO PRI LA PATRODOMO

Neforgesebla patrodomo,
 El malproksim' eterna vok'!
 En vi al mi, al ĉiu homo
 Konata estas ĉiu lok'.
 Sen vi la mond' ne estus mondo,
 Ne estus de sezonoj rondo, –
 Mi estis mi kaj estas mi,
 Kaj hele lumas kor' en mi,
 Lumadas mia koro, dum
 Por mi bruladas hejma lum'.

Patrin' atendas min el vojo,
 Por ŝi mi estas nur infan',
 Irinta ĵus unufoje
 En vivon for de ŝia man'.
 Ho patrodom'! Al via spaco,
 Al vi rapidas mi sen laco, –
 Mi estis mi kaj estas mi,
 Kaj hele lumas kor' en mi,
 Lumadas mia koro, dum
 Por mi bruladas hejma lum'.
 Neforgesebla patrodomo!



jubileoj

Per via varmo kaj bonec'
Vivŝtormojn venkas mi, fantomojn
Malbonajn de diversa spec'.
Sen vi la mond' ne estus mondo,
Ne estus de sezonoj rondo, –
Mi estis mi kaj estas mi,
Kaj hele lumas kor' en mi,
Lumadas mia koro, dum
Por mi bruladas hejma lum'.

Elukrainigis DENTETO

REVENU EL REMEMOROJ

En mia viv' ne iĝu vi malĝoj',
Ne semu triston vi sur mia voj',
El tio povas kreski nur dolor'.
Ĉu tion volus vi kaj via kor'?

Mi petas vin, malbenas ankaŭ vin,
Mi, kiel sorton, ne evitos vin.
Sort' povas esti peza, kun la plor'.
Ĉu tion volus vi kaj via kor'?

Dum miaj jaroj vi ne estu larm',
Ke rememor' ne velku pro malvarm'.
Forflui povas sombre rememor'.
Ĉu tion volus vi kaj via kor'?


Pri vi mi revas, songâs mi pri vi,
Kiel la flamo, estas am' de mi,
Sed devas ni duope gardi ĝin.
Ĉu ne? Ĉu vi ne volus helpi min?

Tradukis DENTETO



Nun, kiel neniam, ni devas batali por la unueco en nia nacio kaj por la frateco en la popolo. Sed sekvante tiujn sloganojn, ni devas zorgi, ke ili estu nenur „la kupro tintanta“, sed plej profunda vero, por kiu indas vivi kaj morti.

Olena Teliha



Nina Daniljuk: **“Studentoj devas vidi veran utilon de Esperanto en la nuntempa pragmatika vivo”**



Doktorino Nina Daniljuk, profesoro de la Orienteŭropa Nacia universitato „Lesja Ukrainka“ (Lucko), estro de la katedro pri la romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko estas bone konata al la ukraina esperantistaro kiel scienculo, verva adepto de la internacia lingvo. Krom siaj profesiaj postenoj ŝi havas gravajn postenojn en nialanda E-movado: ŝi estras la E-centron en la universitato kaj la Ukrainan sektion de ILEI.

■ Volodimir PACJURKO

VP: S-ino Nina! Ukrainaj esperantistoj scias, ke antaŭ kelkaj jaroj vi fondis en la universitato Esperanto-centron. Kio ĝi estas kaj kio vin puŝis fondi ĝin?

Jes, la 3-an de aprilo 2015 en la ĉefa domo de la Orienteŭropa Nacia universitato „Lesja Ukrainka“ ĉe la katedro pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko estis solene malfermita la unua en Ukrainio universitata centro de Esperanto. La centro troviĝas en la ĉambro 241, kie okazas praktikaj lecionoj kun la studentoj de la fakultato de frendlanda filologio. Tie ankaŭ estas malgranda E-biblioteko: diversaj libroj, lernolibroj, revuoj, vortaroj k.t.p.

Mi jam delonge pensis pri tio, ke necesas montri por ĉiuj universitatoj, ke Esperanto estas sukcesa projekto de la planita lingvo, ke ĝi havas sian kulturon, literaturon, movadon, ke multaj konataj sciencistoj, instruistoj, ĵurnalistoj k.a. talentaj homoj okupiĝas pri ĝi. Do, kiam en la jaro 2011 ni fondis en la universitato la katedron pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko, mi komencis instrui la specialajn kursojn „Ĉefaj aspektoj de interlingvistiko“, „Esperanto en aspekto de interlingvistiko“, „Artefaritaj lingvoj kaj interlingvistiko“ kaj petis la ejon. Proksimume en la sama tempo en la universitato aperis aliaj kulturaj centroj. Interese, ke en najbaraj ĉambroj troviĝas la centroj de la araba lingvo kaj kulturo, de la brita kulturo, de la franca lingvo kaj kulturo, de la kanada kulturo, de la sveda lingvo kaj kulturo k.a. Tio signifas, ke la E-centro havas bonan kompanion.

nia intervjuo

VP: Ĉu tia institucio jam estis antaŭe en nia lando aŭ, eble, vi prenis ekzemplon de iuj alilandaj superaj lernejoj? Kie ankoraŭ en Ukrainio kaj en la mondo estas similaj centroj?

En Ukrainio similaj E-centroj ne ekzistis. La ideo aperis, kiam mi en la jaroj 2006-2009 partoprenis Interlingvistikajn Studojn en Adam Mickiewicz-universitato en Poznano, organizitaj de Ilona Koutny. Tiam hungaraj instruistoj rakontis pri la E-Centro en Budapeŝta universitato. Krome, mi partoprenis la internacian konferencon pri universitata agado en Amsterdamo en 2008 j. kaj vidis tie la departamenton pri interlingvistiko.

E-centroj funkcias en diversaj landoj: E-Instituto en Hago, Nederlando (mi estis tie en la jaro 2008), E-Kulturcentro en Kastelo Grezijono, Francio (mi gvidis tie kursojn de E kaj de la ukraina lingvo en la jaro 2015), Kulturcentro Kvintpetalo (Francio), E-centro en Herzberg (Germanio), Seula E-centro (Suda Koreio), Eŭrazia Kultur-centro (Hungario), la E-biblioteko en Ŝimonoseki (Japanio) k.a. Ili havas diversajn poziciojn kaj diversajn taskojn, sed ludas gravan rolon en disvastigo de la lingvo kaj de la E-kulturo. Mi scias pri streboj de Eŭgeno Kovtonjuk malfermi E-centrojn en Kijivo kaj Ĉernivco, estus bone havi ilin en Lvivo, Ternopilo kaj Odeso.

La estraro de UEA kaj ILEI montras grandan atenton al la laboro de E-centroj. Ekzemple, dum la 49-a konferenco de ILEI en Nyíregyháza (Hungario, (2016) okazis 3 kunsidoj rilate al tio, estis fondita speciala komisiono pri universitata agado kaj Elena Nadikova estis elektita kiel estrarano pri E-centroj. Prezidanto de UEA Mark Fettes prave diris: „Nuntempe multegaj homoj eklernas E-on per la reto. Sed malmultaj eniras movadon. E-centroj povas esti la ponto, kiu ligas retajn lernantojn al la vivanta E-kulturo“. Krome, E-centroj povas pli aktive eduki novajn esperantistojn kaj amikojn de E.

VP: Kiel vi organizas la funkciadon de la centro? Laŭ nia opinio, ĝi estas ne nur ejo kun bela E-flago kaj esperantaĵoj sur la tablo aŭ bretoj. Kiu planas kaj efektivigas la laboron de la centro? Kiel estas engaĝataj al lia funkciado studentoj de la universitato? Kiom da ili lernis (scias) Esperanton?

Ni fondis la centron por okazigi ne nur lecionojn, sed por pli profunde konatigi studentojn, aspirantojn, instruistojn k.a. kun la problemo de la interkultura komunikado, por organizi sciencajn rondajn tablojn, konferencojn, seminariojn, okazigi la kunsidojn de E-klubo „Arbara kanto“. En la centro ni jam organizis 4 sciencajn rondajn tablojn, kelkajn kunvenojn de E-klubo „Arbara kanto“, renkontiĝojn kun la ukrainaj kaj la eksterlandaj gastoj.

Mi estas estro de la centro, do, mi planas, kun helpo de mia katedro kaj klubanoj efektivigas la laboron de E-centro. La studentoj de miaj specialaj kursoj nepre partoprenas ĉiujn eventojn, kiujn ni organizas en la centro, havas mini-kurson de E (ĉiujare estis proksimume 100 magistroj), aliaj studentoj (precipe filologoj) – laŭdezire. La problemo estas, ke la studentoj finas la universitaton, forveturas kaj mi komencas instrui denove.

VP: Kiel rilatas al via institucio la estraro de la universitato? Ĉu la centro por ĝi estas, ni diru, amatora rondeto aŭ io alia? Kiujn viajn aranĝojn vi trovas sukcesaj?

La estraro bone rilatas al la centro. Por fondi ĝin ni kun la prezidanto de UkrEA Eŭgeno Kovtonjuk kaj Niko Vološin speciale renkontiĝis kun la rektoro Ihor Kocan kaj la dekanino Oksana Rohač por konvinki ilin, ke estas inda afero. Nun ili vidas la rezultojn de nia laboro por la universitato. Okazis sukcesaj sciencaj rondaj tabloj: „Ĉefaj

aspektoj de interlingvistiko”, „Funkciado de la internacia lingvo Esperanto kaj ĝiaj studoj” (2015), „Lesja Ukrainka en la mondo de tradukoj“, „Novaj metodoj de la instruado de la gepatraj kaj fremdaj lingvoj kaj literaturoj“ (2016). Ilin partoprenis ukrainaj kaj eksterlandaj esploristoj, instruistoj kaj esperantistoj (inter ili – Stefan MacGill, Yoichi Arai, Eŭgeno Kovtonjuk, Mikaelo Linecjkij, Oleksandro Hriŝcenko, Sergio Ŝmatkov, Andreo Jankovsjkij k.a.)



VP: Kiujn rilatojn havas via centro kun esperantistoj (organizaĵoj) de fremdaj landoj? Kiujn formojn de kunlaboro kun ili vi praktikas, je kiaj niveloj?

Ni havas bonajn rilatojn kun E-Kulturcentro en Kastelo Grezijono (Francio), kun la profesoroj de Interlingvistikaj Studoj en Adam Mickiewicz-universitato (Pollando), kun la instruistoj el la universitato de Oriento en Timiŝoara (Rumanio) k.a. Ni invitas ilin partopreni niajn aranĝojn kaj ili invitas nin. Kiel mi jam diris, en aŭgusto de la jaro 2015 post UK mi dum lingva semajno instruis la ukrainan lingvon por dezirantoj (kaj venis multaj!), dum familia semajno instruis E-on. Estas ideo organizi en Kastelo staĝon por ukrainaj studentoj (nur estas malgranda problemo – mono). Mi sendis la materialon pri lingva situacio kaj lingva politiko en Ukrainio, kiu estis prezentita dum la Internacia E-rumana kolokvo „Esperanto – ponto inter lingvoj kaj kulturoj“ (novembro, 2016). Se ni estos pli fortaj, surbaze de nia universitato eblas organizi staĝon por esperantistoj.

VP: Vi estras la Ukrainian sektion de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Vian centron antaŭ du jaroj vizitis ĝia iama prezidanto Stefan MacGill. Kiel li taksis laboron de la centro kaj kiel lia vizito influis ĝian pluan funkciadon?

Jes, Stefan MacGill partoprenis la scienca rondan tablon „Funkciado de la internacia lingvo Esperanto kaj ĝiaj studoj” (oktobro, 2015 j.). Li prelegis dum la ronda tablo pri la projekto AMO (Aktivula MaturigO por kapablo de gvidantoj de E-movado) kaj SPAMO (Seminarioj Pri Aktivula MaturigO), kies gvidanto en UEA li estis. Ni havis

nia intervjuo

renkontiĝojn kun la estraro, kun la katedraj instruistinoj, kun la klubanoj de „Arbara kanto“, kun la studentoj kaj li restis tre kontenta. Post tio Stefan pli aktive subtenis la ideon pri universitata kunlaboro kaj pri speciala komisiono de UEA kaj ILEI, kiu okupiĝos pri tio.

VP: Ne estas sekreto, ke nia lando havas relative malmulte da esperantistoj? Kiuj problemoj kaŭzas tion kaj kiel vi vidas la vojojn de la aktivigo kaj plifortigo de nialanda E-movado?

Necesas pli aktive instrui, fondi E-klubojn kaj E-centrojn en mezaj kaj superaj lernejoj. Sed por ke novuloj ne perdiĝu, ni proponu interesajn, bone preparitajn renkontiĝojn (kiel „La Oresto Kuzma-Tagoj“), komunajn projektojn kun eksterlandanoj por ke ili vidu veran utilon de Esperanto en la nuntempa pragmatika vivo.

VP: Kion vi volus deziri al niaj esperantistoj en la jaro de Zamenhof?

Mi deziras pacon, amikecon kaj fruktodonan laboron!

historio de la e-movado en Ukrainio

Viktor JASKOVEC, Ivano-Frankivsk

KRITIKO PRO LA SENKRITIKECO

La 20-23-an de aŭgusto 2016 en Kolomeo okazis la tria E-aranĝo “Oresto Kuzma-Tagoj” (OKT). Tiuj, jam tradiciaj kunvenoj de esperantistoj, distingiĝas per tio, ke la partoprenantoj ne nur faras ekskursojn en la Karpata montaro, interkomunikiĝas kun la amikoj kaj ripozas, sed ili ankaŭ havas eblon ekscii ion novan kaj interesan pri la Lingvo Internacia kaj ties historio en Ukrainio, ĉar kadre de la OKT-oj okazas sciencpraktikaj konferencoj. Materialojn de tiuj konferencoj oni aperigas en la formo de broŝuroj kaj, se kalkuli ĉiujn publikigitajn materialojn ekde jaro 2013¹, la kvanto da ili jam superis du dekojn.

Tiujare mi havis ŝancon prelegi samkunside kun la fama esperantisto kaj sciencisto Jaroslav Matvijiŝin. Lian prelegon, kiu koncernis la trovitajn de li arkivajn leterojn de la kolomea E-societo “Progreso” al Miĥajlo Hruŝevskij (1913), de esperantisto kaj poeto Vasil Bobinskij al verkisto Miĥajlo Jackiv (1916), kaj de Leontij Kuzma, la patro de Oresto Kuzma, al Ivan Franko (1911), mi aŭskultis kun granda intereso. Hejme mi ankoraŭ kelkfoje tralegis tiun prelegon en la materialoj de la konferenco². La prelego estas publikigita en la scienca stilo ukrainlingve kaj, sendube, estos uzata por pluaj esploroj, ĉar ĝi tion meritas.

Bedaŭrinde, la aŭtoro ne ĉiam kritike citas la fontojn kaj konkludas, pro tio en la artikolo aperis certaj malĝustaĵoj. Tial, por eviti en estonteco disvastigon de tiuj

malĝustaĵoj, mi volas rimarkigi pri ili kaj petas konsideri tion dum plua citado de indikita studaĵo de estimata s-ro Matvijišin.

1. a) En la piednoto sur la p. 39 estas skribite “тепер вул. О. Кузьми”. Oni devas scii, ke nun la strato nomiĝas “Родини Кузьми”.

b) Sur la p. 45 la verko de M. Jackiv estas titolita “Мрія орла”, kvankam ĉie en la literaturo ĝi titoliĝas “Мрія вірла”. Kaj en “Ukraina Stelo” ĝi estis aperigita ne en la jaro 1923, sed en la 1913.

c) Sur la p. 47 en la fontindiko 5 estas skribite “Viena Nacia Biblioteko”. Sed ĝuste oni skribu “Aŭstria Nacia Biblioteko”.

2. Sur la p. 40, en la kunteksto de la rakonto pri Oresto Kuzma, la aŭtoro subite mencias pri Volodimir Suprunivskij, kiu “sendis siajn tradukojn al O. Kuzma” kaj pravas tion per indiko de eldono de la ukrainigita far Suprunivskij novelo de Gogol “Taras Bulba” en la kolomea eldonejo OKA en 1924 “dank’ al apogo de O. Kuzma” kaj kontraŭ monrimedoj de O. Kuzma. Sed oni devas scii, ke ĉi tie temas ne pri Oresto, sed pri Osip Kuzma, kiu estis posedanto de la eldonejo OKA en Kolomeo. Osip Kuzma havis nenian rilaton al Esperanto, nek al Oresto Kuzma³. Tial mencio en la artikolo pri V. Suprunivskij estas tute senbezona.

Oni devas diri, ke komence de la 20-a jarcento vivis kelkaj agantoj, nomataj O. Kuzma. S-ro Matvijišin sur la p. 45 ĝuste skribas, ke estis Oresto Kuzma, sed ankaŭ estis Oleksa Kuzma⁴, sed oni devas scii, ke estis ankaŭ Osip Kuzma kaj ne fari unu personon el du.

3. Sur la pp.41-42 estas prezentita fragmento el la letero de Vasil Moroz el Ĉernivco, kiu invitis Ivan-on Franko-n veni Ĉernivcon. En la piednoto 8 s-ro Matvijišin subite konkludas: “La aŭtoro, verŝajne, ne sciis, ke I. Franko jam vizitis Ĉernivcon”. Sed el la proponita fragmento tute ne sekvas tia konkludo, ĉar, se I. Franko jam iam vizitis Ĉernivcon, ĉu tiu fakto malhelpas aŭ malpermesas inviti lin eĉ ĉiujare vizitadi ĉi urbon?

Kaptante la okazon, mi, siavice, sciigas al estontaj esplorantoj pri la biografio de Vasil Moroz sekvajn konatajn al mi faktojn: a) “Ukraina Stelo” n-ro 3-4, 1913, p. 37-38 enhavas esperantigon de la verko de Olha Kobilanska “Almozulino” (“Жебрачка”), subskribitan “El ukraina lingvo tr. V. Moroz”. b) Leś Denysiuk menciis s-ron Moroz el ‘Czerniwci’⁵. Konsiderante la fakton, ke la Universalan Kongreson en Krakovo 1912 partoprenis unu reprezentanto el Bukovino⁶, oni povas supozi, ke tiu estis nome la menciita aktiva esperantisto Vasil Moroz. c) en unu ukraina ĵurnalo eldonita en Vieno en 1916 oni sciigis pri honorigo de la grupestro de Ukrainaj Bukovinaj Volontuloj Vasil Moroz per Bronza Medalo de Kuraĝo⁷. Konsiderante plenan koincidon de la person- kaj familinomo (Vasil Moroz), kaj ankaŭ geografian ligitecon (Bukovino), oni povas kun granda probablo supozi, ke tie temas ankaŭ pri la sama esperantisto Vasil Moroz.

4. Sur la p. 42 estas menciita nepublikigita dulingva dokumento “pri kiu temos aparte”. Bedaŭrinde la aŭtoro ne sciigas, kiam kaj kie pri ĝi temos. Anstataŭe s-ro Matvijišin rakontas pri la franca esperantisto Henri Guilbeaux, kio tute ne koncernas la temon de la prelego.

5. Sur p. 45 estas menciita esperantisto Vasil-Volodimir Bobinskij. Sed en la piednoto 22 estas skribite, ke lin oni ne devas miksi kun la poeto Vasil Petroviĉ Bobinskij. Sed ĝusteco estas en tio, ke, kiel tion indikis ankoraŭ Volodimir Pacjurko, tiuj du Bobinskij

historio de la e-movado en Ukrainio

reale estis unu persono kun plena nomo Vasil-Volodimir Petroviĉ Bobinskij. Pri li jam ne unufoje oni skribis sur la paĝoj de ukrainaj E-eldonoj. Tial ĉi okaze estas male – el unu persono la aŭtoro faris du.

6. Kaj finfine estas stranga informo en la piednoto 12 sur la p. 43, kie estas skribite, ke en 1922 Oresto Kuzma esperantigis la artikolon de Miĥajlo Hruŝevskij “Cirila-Metoda frataro”, sed ial eldonis ĝin sub la titolo “Resumo de la ukraina historio” kaj, krom tio, kiel suplemento al la biografio de Taras Ŝevĉenko (?), kvankam Oresto Kuzma mem indikis fonton de sia traduko. Tian miksaĵon ankoraŭ en 1991 kelkfoje aperigis nun forpasinta profesoro el Ivano-Frankivsko Volodimir Polek (Володимир Полек). Post tiu tempo jam pasis kvaronjarcento, sed la nekonformeco en eldonoj de V. Polek ial ne streĉis atenton de s-ro Matvijišin. Por havi pli-malpli ĝustan imagon pri sola esperantigo de verko de M. Hruŝevskij, mi preparis propran esploron⁸.

Entute, ne konsiderante menciitan senkritikecon de la aŭtoro, la artikolo estas tre valora en plano de esplorado pri ukraina E-movado komence de la 20-a jarcento pro publikigo de nevaste konataj arkivaj dokumentoj.

¹ Tiam okazis la konferenco, sed ne OKT, kiun oni decidis aranĝi nur ekde jaro 2014.

² Матвійшин Ярослав. Листи Ореста Кузьми до Михайла Грушевського та Василя Бобинського до Михайла Яцкова. // Ivan Franko kaj Miĥajlo Hruŝevskij – du titanoj de la ukraina kulturo. Materialoj de la sciencpraktika konferenco, la 20-21-an de aŭgusto 2016, Kolomeo-Krivorivno / kompil. V. Pacjurko. – Lucko, “Helianto”, 2016. – pp. 39-48.

³ Kvazaŭaj familiaj rilatoj de Osip Kuzma al Oresto Kuzma nuntempe estas hipotezaj kaj senpruvaj.

⁴ Estas strange, sed en la artikolo “MATVIICHINE. Viena periodo de Z.KUZIELA. Матвійшин Я. Перший Віденський період З.Кузели за його неопублікованими листами до М.Грушевського (1903-09)” (https://www.academia.edu/19888860/MATVIICHINE._Viena_periodo_de_Z.KUZIELA._) Oleksa ial fariĝis Ostap (?).

⁵ “Ukraina Stelo” n-ro 5, 1913, p. 54.

⁶ “Ukraina Stelo” n-ro 5, 1913, p. 53.

⁷ “Бронзову медалю хоробрости одержали ... Українські Буковинські Добровольці: ... роєві: ... Василь Мороз.” (Вістник СБУ, 1916, №43 (103), стор. 408).

⁸ Jaskovec Viktor. Historio de sola esperantigita verko de Miĥajlo Hruŝevskij. // Ivan Franko kaj Miĥajlo Hruŝevskij – du titanoj de la ukraina kulturo. Materialoj de la sciencpraktika konferenco, la 20-21-an de aŭgusto 2016, Kolomeo-Krivorivno / kompil. V. Pacjurko. – Lucko, “Helianto”, 2016. – pp. 28-31; kaj: “Ukraina Stelo” n-ro 3, 2016, pp. 14-16.



Se en la mondo ekzistis nur unu lingvo, la homaro gajnis unu trionon de sia vivo – tiun, kiu estas malŝparata por lingvoj.

G. W. Leibnitz

EL LA POEZIA KAJERO DE PETRO PALIVODA

ROZO

Ŝi sole staris,
triste mirigita,
ĉar opiniis,
ke ŝi estas
ununure bela,
sed tamen floroj
ĉi belecon
ial ne rimarkas...
Kaj ŝi ne sciis:
floroj ĉiuj
estas ja reĝinoj.

Ridetis al mi
idioto
kaj min salutis.
Stultege
mi skuis la kapon
kaj ion balbutis.
Ne scias mi nun,
kiu estas
pli saĝa.

ANTAŬGARDECO

Najbarino,
malklera
avino Maria,
diris,
rigardante
la televidilan
ekranon:
Verŝajne,
ili de tie
nin vidas.
Mi scias,
ke ŝi malpravis,
sed nun,
kiam mi
min alivestas,
aŭ (silentu!)
rekalkulas monon,
la televidilon
por ĉiu okazo
mi ĉiam malŝaltas.

IDENTIGO

homo rigardis
en speguleton
kaj diris al si
ne simila
kaj poste bruligis
cigaron
ekpluvis
kiel tiam vespere
tamen eĉ arboj
jam iĝis aliaj

SENPAROLO

ploreĝaj okuloj
de vento
silento
de nokt' senflugila
kaj frapas
sur la fenestron
vortoj
ne enlasitaj
en verson



Ukrainineto (penetraĵo de Natalia PENDJUR)

ARTO EN LA TRADUKO

La angla originalo unue aperis en la aŭtuna 2010 numero de „Source“ – reta bulteno de Literatura Fako de ATA (Amerika Tradukista Asocio) kja poste estis surpaperigita por la januara numero 2011 de „The ATA Chronicle“. La publikado de la traduko estas permesita.

„En piedpilkado bone ludi ne sufiĉas: oni devas senti la ludon profunde“.

Jules Rimet

En Madrido somere estis varmege. En mia loĝejo estis sufoka aero pro la fermitaj fenestroj, kaj la malfermo de ili ne multe helpis. La ĉiujara forveturo de patrinoj kun infanoj atingis sian apogeon, kaj la urbo sentis sin komforte malplena pro la foresto de tiuj, kiuj retirigis de la varmego por pasigi kiom eble plej longan tempon en la montaro aŭ ĉe la marbordo. Por mi tio estis la plej ŝatata tempo de la jaro.

Estis jam post la noktomezo, kaj mi sidis meze de la lummakulo en la malluma gastoĉambro en la tria etaĝo. La fenestro antaŭ mi estis malfermita, enkadrigante mian vidon de la nokta ĉielo, pendanta super la kvieta kvartalo. La varma aero pigre kirligis ĉirkaŭ mi kaj mi sidis ĉe mia skribtablo, la fingroj estis sur la klavaro de mia tajpilo – verda portebla *Olivetti*, mia fiero kaj ĝojo.

Estis kutima afero. Oni telefonis al mi posttagmeze por diri pri mendoj kun strikta limdato, kaj ke oni bone komprenas, ke la tarifoj inkluzivos krompagon pro la urĝeco, ĉu tio min interesas? Konsuela enlitiĝis post la vespermanĝo kaj mi restis kun *Olivetti* kaj la rakonto pri plej intrigaj postkulisaj fiaferoj en la ŝere-komerco en Andaluzio, kiuj plenigis la senordan historion de la suda Hispanio. Bone verkita de vera hispano, kun tre agrabla flueco kaj stilo, ĝi estis gracie bildeca, vera plezuro por legi. Miraklo! Kaj longa – do, mi planis ne dormi la tutan nokton.

Frumatene Konsuela stariĝis malantaŭ mi, tenante siajn manojn sur miaj ŝultroj kaj rigardante la ĉielon. „Vi ĉiam faras tion, ricevante ion similan,“ – ŝi diris. Mi kapjesis. „Via traduko fariĝas via *querida*¹, – ŝi murmuris, deturnante sin, – via amatino.“ Ŝi pravis. La similan tradukon oni devas trakti atente. Ĝi enhavas tiom da nuancoj kaj subtilaĵoj, ke oni devas senbarakte permesi la entiriĝon. Tio postulas cedi pormomente la tutan vivon kaj, siavice, stimulas pinglopintan fokusiĝon, kiu estos riĉe rekompencita.

Vicoj de miaj pensoj estis interrompitaj, kaj mi rektiĝis streĉante min en la seĝo. Mia kolo estis rigidiĝinta, ankaŭ la ŝultroj. Mi ekstaris, proksimiĝis al la fenestro kaj rigardis malsupren. Viro promenis laŭ la troruaro de la kontraŭa stratflanko, lia ombra silueto longiĝis en la lumo de la stratlanternoj. Unu mano en la poŝo, la alia svingiĝis flanke. Atinginte la angulon, li malaperis. Nun la strato estis senhoma kaj kvieta, kaj strange bonvena. Mi lasis letereton sur la tajpilo kaj iris malsupren. La kafejo “Gijón“ estis proksime, kaj estos agrable promeni tien. “Gijón“, ŝajne, neniam estis fermata, kaj kelkaj gastoj jam sidis tie, kiam mi venis. Mi mendis viskion kun sodakvo en alta glaso.

Ies mano falis sur mian ŝultron, kaj mi turnis min: „*Hombre, Javier!*”^{2c} Ksavero estas verkisto, kiu pro diversaj cirkonstancoj laboras ankaŭ kiel tradukisto. Li komprenas noktulojn laŭ la propra sperto kaj pro tio demandis: „Kiel vi fartas?” „Ĉio bonordas, – mi diris al li. – La rakontado estas bona, estas nenioj problemoj kun terminaro, sed mi penas transdoni la tonon de la originalo, vi ja scias, la etoson, la *dejo*³, la esencon de Andaluzio, kio estas tiom grava parto de la novelo. Ĝis nun mi ne kaptis tion.”

Ksavero larĝe ridetis kaj mendis ankoraŭ po glaso. „Etoso? Dejo? Esenco? Kiaj vortoj!! Kion vi intencas fari – krei artaĵon?” Mi pensis momenton, kirlante per fingro la glacikubetojn en mia glaso, kaj diris: „Jes, fakte tion mi volas fari.” Ksavero pristudis mian vizaĝon, liaj brovoj leviĝis. „Vi komprenas tion ĉi, – mi daŭrigis. – Ni tradukas diversspecajn dokumentojn; iuj estas teruraj kaj aliaj estas pli-malpli interesaj, kelkaj estas bone verkitaĵoj, sed tre malofte ni trovas ion nepre tradukindan. Tio ĉi estas unu el tiaj. Mi volus fari tion, kion faris la verkisto hispane. Mi volas, ke la angla versio posedu la saman *duende*⁴, la saman magian kvaliton, kiel la originalo.”

Ksavero kapjesis kaj ekridetis: „Mi rekonas tiujn ĉi simptomojn! Ankaŭ mi suferis tion, samkiel vi ĉi-vespere. Laŭ mi, amiko mia, transfuzon de flamenko – jen kion vi bezonas ĉi-momente. Ni iru al „Las Brujas”⁵, mi regalas.”

Ekzistas nenio pli animplena, ol la voĉo de la flamenkokantistino, precipe kiam ŝi interplektiĝas en la serenado kun la muziko de la flamenka gitaro kaj senvuala pasio de la flamenkodancisto. En la malhela, fuma lumo en „Las Brujas” ni eksentis la pulsadon de klakantaj manoj kaj la frapadon de kalkanumoj, kaj ni ekspiris pli profunde. „Vi deziras priskribi la odoron kaj la esencon de Andaluzio? – kriegis Ksavero. – Tio ĉi estas vera Andaluzio.” Li pravis. Flamenko venis de Nord-Afriko kun la maŭroj kaj la suda Hispanio heredis la muzikon de la dezerto. Ekde tiam la grandaj urboj Granado, Sevilo kaj Kordobo produktis generacion post generacio flamenkoartistojn, kiuj konservis la tradiciojn de siaj prapatroj, de tiuj, kiuj ekloĝis en Andaluso. „Tion, kion vi povas aŭdi en flamenka taverno, kiel tiu ĉi, ankoraŭ ne estas la tuto, – aldonis Ksavero. – Iam sidiĝu kviete, dezirinde kun la okuloj fermitaj, kaj aŭskultu – atente aŭskultu! – *Recuerdos de la Alhambra* de Tárrega⁶. Vi enprofundiĝos en la esencon de la sudo.”

La strato estis senhoma, kiam ni eliris el la drinkejo. Ni piediris tra la Calle Mayor al la Paseo kaj baldaŭ ekvidis la Muzeon Prado, blanke lumanta apud la Parque Retiro. „Ĉu vi deziras meti iom da arto en vian tradukon? – demandis Ksavero, montrante per la cigaro. – Estas multe da arto tie!”

„Estas domaĝe, ke ĝi estas fermita,” – mi diris.

„*Por favor!*” – kraĉetis Ksavero, frapante la frunton per la libera mano. – Kiel vi intencas enmeti arton en vian tradukon kun la simila sinteno? Iru kun mi!” Li prenis min ĉe la brako kaj kondukis min trans la straton, poste li malrapide promenis min tien kaj reen laŭ la apudmuzea trotuaro, parolante serioze kaj insiste: „Se vi volas, ke via traduko estu arta kreaĵo, la arto devas esti ene de vi. Ĉio vidata kaj komprenata de vi inspiru vian vortelekton. Pensu pri la pentraĵoj kaj la skulptaĵoj, viditaj tie ĉi. Memoru pri Goya, Velásques, la malnovaj majstroj, ĉu vi povas imagi ilin en via menso? Rigardu ilin pli atente. Ili ja alparolas vin, ili volas ion diri al vi. Aŭskultu!”

Mi faris tion, kaj mia menso estis plenigita per pensoj pri formo kaj koloro, proporcio kaj perspektivo. La fingroj sur la manoj de la statuo komencis moviĝi kaj la siluetoj

tradukado

de ĝia ŝtona korpo memorigis al mi jam konatan belecon. Resono de la historio eniris mian memoron, kaj la pasinteco klariĝis. Ĉio havis ritmon kaj kialon, kaj mi eksentis, kion oni penis diri. Subite mi ekvolis reveni al mia traduko. Mi diris tion al Ksavero kaj li ekridis: „Ĉu vi aŭdis la urĝan vokon de la amatino, kiun vi ne povas ignori? Do, tempo venis. Ni iru hejmen!“

Ni devis trapasi nur kelkajn kvartalojn, kaj promenado estis agrabla: unu mano en la poŝo, la alia svingiĝis flanke. La senhomeco de la stratoj kreis senton de la spaco, proponanta senfinajn eblecojn. La graciaj linioj de la trafikcirklo aludis al pli frua epoko, kiam estis tempo por halti kaj ĝui specifajn momentojn, vivi pli malrapide kaj en harmonio kun ĉirkaŭo. Estis idiliaj tempoj, venis al mi en la kapon, kiam ŝereo estis personigo de la vivmaniero.

Denove hejmo, la lampo ankoraŭ lumigas la tajpilon. Mia letereto restis nelegita. Mi fermis la kuirejan pordon kaj preparis iom da kafo. Poste mi staris ĉe la fenestro kaj rigardis la unuan lumstrion, aperanta sur la horizonto. Mia menso estis klara kaj mi sentis min ekscitiĝinta. Mi sidiĝis kaj eklaboris.

Esperantigis membroj kaj amikoj de la Esperanto Societo de Ŝikago

¹ amatino (hispane)

² Ksavero, amiko (hispane)

³ tie ĉi – odoro, gusto (hispane)

⁴ elfo (hispane)

⁵ La sorĉistinoj (hispane)

⁶ Francisko Tárrega (1852-1909) – hispana gitaristo, komponisto, muzikinstruisto

⁷ Mi petas vin (hispane)

EKSKUZO

Dum engaĝigo de la kvara pasintjara numero de nia gazeto estis preteratentitaj kelkaj misoj.

Sur la paĝo 19 super la artikoltitolo „Fruaj esperantigoj de verkoj de Ivan Franko“ elfalis la nomo de la aŭtoro kaj lia loĝloko: Viktor JASKOVEC, Ivano-Frankivsko. Lia materialo daŭrigas la rubrikon „Jubileoj“. Sekve, sur la paĝoj 19-22 anstataŭ la rubriko „Historio de la E-movado en Ukrainio“ devas esti „Jubileoj“.

Sur la paĝo 27 post la lasta linio de la poemo de M. Rilskij (Серед хвиль і бурунів.) devas esti duobla interlinia spaco. La nomo de la sekva aŭtoro „Іван АНДРУСЯК“ devas aperi kursive per grasa tiparo. Post ĝi devas esti ordinara interlinia spaco.

Sur la paĝo 6 en la tria linio sub la titolo „La Prezidio de UkrEA“: ne estis korektita mistajpo en la vorto „organizaĵoj“.

Ni petas la legantojn kaj s-ron V. Jaskovec ekskuzi niajn misaĵojn.

La redaktoro

**
*

- Sinjoro doktoro, kion mi faru, por ke mi povu vivi cent jarojn?
- Ĉu vi drinkas, fumas, amindumas virinojn aŭ ludas kartojn?
- Ne, neniu el tiaj aferoj interesas min.
- Tiam iru al diablo! Kion vi volis dum tiuj cent jaroj fari en tiu ĉi mondo?

**
*

- Gasto en la restoracio atente studas la menuon kaj poste demandas la kelneron:
- Kio estas tio via „Kokido a la Mercedes“?
 - Tio estas la kokido, kiun nia estro hieraŭ veturmortigis per sia aŭto.

**
*

- Ho, vi trinkas mineralakvon! Mi vidas, ke vi aktive batalas kontraŭ alkoholo...
- Jes, kontraŭ la hieraŭa.

**
*

- Imagu al vi: apenaŭ komenciĝas la matena gimnastiko en la radio, mia edzo saltas el la lito.
- Ĉu li matene gimnastikadas?
- Li ne, sed la fraŭlino en la fenestro vid-al-vide.

**
*

- Fanfaronas artpentristo:
- Vidinte miajn bildojn homoj mutiĝas.
 - Ĉu vere? Kaj kiam vi havos ekspozicion? Mi sendos tien mian edzinon.

**
*

- Gasto provas eniri en ludkazinon en Monte Carlo.
- Pardonu, – haltigas lin la pordisto, – sed ĉi tien oni ne rajtas eniri sen kravato.
 - Kial? – protestas la gasto. – Jen apud vi staras ulo, kiu eĉ ĉemizon ne surhavas?
- Ĉu li rajtas?
- Jes, ĉar li ne estas venanta, sed foriranta.

La redakcio kore dankas al s-ro Andreo Jankovskij, kiu donacis al la fonduso de “Ukraina Stelo” 500 hrivnojn.

Legu en la sekva numero de nia gazeto:

- ◆ la priukrainian artikolon de Edmond Privat „Vekiĝo de la granda nacio“, verkitan antaŭ 100 jaroj;
- ◆ rakonton pri la talenta ukraina komponisto Miĥajlo Hajvoronskij omaĝe al la 125-a datreveno de lia naskiĝo;
- ◆ esperantigitajn verkojn de la fama ukraina poeto, brila prozisto-humoristo Osip Makovej, kies 150-jariĝon ni celebras ĉi-jare.

Transsendu nian gazeton al viaj konatoj kaj geamikoj enlande kaj eksterlande!



Mendu librojn kaj gazetojn

„Ukraina Stelo“, p.k. 26, Lucko-18, UA-43018, Ukrainio
ĉe Niko Voloŝin laŭ la retadreso: niko_helianto@yahoo.com